poste la afero ne prosperis.
La E-grupo de Gijón organizis renkontiĝon de ĉiuj konataj esperantistoj de Asturio. La renkontiĝo okazis en nia urbo la 10an de julio de 1960 kaj venis samideanoj el Oviedo, Avilés, Pravia, Langreo… Tiujare oni perceptis intereson pri la Internacia Lingvo ankaŭ en Cangas de Onís, sed ne estas posta informo pri formiĝo de Esperanto-grupo en tiu loko.
En la sekvintaj jaroj oni ripetis la renkontiĝon de la geesperantistoj de Asturio en Gijón dum la somero.
Post longa silento, la aktlibro de la E-grupo de Gijón priskribas kunsidon, la 12an de decembro 1966, de Restrikta Estraro de la grupo, konstituita nur de Alberto Menéndez, Prezidanto, José Ordieres, Sekretario kaj Kasisto, kaj Santiago Mulas, Bibliotekisto. Oni decidis la organizadon de ekspozicio de muraj kalendaroj el la tuta mondo, esperantistaj kaj ne esperantistaj. Estis alia kunsido de la sama Restrikta Estraro la 12an de januaro de 1967. En ĝi oni plu traktis la aferon de la organizado de la ekspozicio de muraj kalendaroj.



Marto de 1967. En la ekspozicio pri mur-kalendaroj. De dekstre al maldekstre: Alberto Menéndez, Carmina Argüelles, Santiago Mulas kaj José Ordieres Dacosta.

En la Organiza Komitato de tiu ekspozicio estis inkluditaj Carlos, Florita kaj Carmen Argüelles.
La sekva akto, de la 10a de marto, temas pri kunsido de la tuta Organiza Komitato de la ekspozicio por plu trakti pri la laboroj de preparado kaj la kosto de la ekspozicio. Dum la lastaj semajnoj de tiu monato la publiko de Gijón povis vidi tiun ekspozicion kaj la rezulto tiel estis sukcesa kiel tiuj de la jaroj 1958 kaj 1959. La lokaj pres-aro kaj radio amplekse informis pri tiu esperantista akto. La loka radio emisiis iun kulturan noton, verkitan de Alfredo Villa, pri la graveco kaj situacio de Esperanto en la mondo kaj en rilato kun UNESKO.
La 1an de aprilo kunsidis la tuta estraro de la grupo por analizi tiun rezulton de la ekspozicio kaj en ĝi oni decidis la organizadon de nova kurso (intensiva) de Esperanto en la Ateneo Jovellanos. Tiun kurson gvidis Santiago Mulas; tiele estis registrita en la aktlibro temante pri kunsido de la estraro kiu okazis la 5an de majo. En ĉi tiu kunsido oni informas pri la plano de du vintraj E-



Marto de 1967. Ekspozicio pri Mur-kalendaroj